



ESPERANTO

NORMANDA BULTENO

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 7,62 Eŭroj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

KIAL KAJ KIEL MI FARIĜIS ESPERANTISTO ?

Se oni demandus al diversaj samideanoj kial ili lernis Esperanton, oni certe ricevus tre malsimilajn respondojn. Kelkaj lernis ĝin pro idealo, aliaj por pli facile vojaĝi aŭ havi kontaktojn kun la tuta mondo, aŭ ĉar ili hazarde konstatis la praktikan efikecon de tiu lingvo. Mi, ekzemple renkontis dum la internacia kongreso en Mainz en 1958, Italon kiu diris al mi tion: *Pasintjare, mi feris en sudo de Francio kaj vizitis Marseille. Tiam, okazis tie Universala Kongreso de U.E.A. Mi tute ne kredis je la valoro de Esperanto, sed mi tamen decidis viziti la kongreson pensante ke mi versajne iom ridos vidante la kongresanojn pli malpli vane provi interkompreniĝi. Sed la spektaklo estis tute alia ol mi imagis, kaj vidinte kiel taŭga estas tiu lingvo, mi tuj decidis lerni ĝin kiel mi estas ĉi-tie hodiaŭ*".

Laŭ mi estus interese ke multaj homoj klarigu kial kaj kiel ili studis Esperanton. Do kiel unua ekzemplo, jen mia kazo kiu montros ke, foje, pluraj faktoroj povas havi influon, unu post la alia. Mi naskiĝis en Fécamp, kie dum pluraj jaroj elsendis "Radio-Normandie" kaj mia familio ofte aŭskultis ties elsendojn. Je tiu epoko, estis malpermesate en Anglio reklami per radio, kaj pro tio Radio-Normandie havis elsendojn ankaŭ en la angla lingvo. Do kiam mi estis tre juna (eble 4 aŭ 5 jara), mi konstatis kun granda surprizo, ke ekzistas homoj kiuj tute ne parolas kiel ni, kaj tio donis al mi la deziron ekkoni ilin. Tiu scivolemo daŭris, kaj kelkajn jarojn poste, kiam mi scipovis legi, iam mi patro aĉetis foto-filmon kaj mi prenis la paperfolion kun plurlingvaj teknikaj klarigoj el la skatolo kaj, scivolema, komparis la diversajn tekstojn. Tiam, mia patro diris al mi ke ankaŭ ekzistas alia lingvo, nomata "Esperanto" por paroli inter diverslingvanoj, kaj ke li lernis ĝin kiam li estis pli juna, kaj uzis ĝin por korespondi kun alilandanoj. Tio multe interesis min, kaj samtempe mi eksciis, ke mia kuzo el Parizo ankaŭ scipovis paroli tiun internacian lingvon. Tiu kuzo tiam estis fraŭlo, sed 2 jarojn antaŭ la milito, li edziĝis kun angla esperantistino, kaj mi tiam unuafoje aŭdis paroli Esperanton, kun multe da intereso.

Dum la postaj jaroj, mi lernis la anglan lingvon en la lernejo, kaj preskaŭ tuj post la milito, malfermiĝis en Fécamp Esperanto-kurso gvidata de Sro Bosc, kiu tiam prezidis nian normandan asocion. Kompreneble, mi partoprenis ĝin kaj decidis studi pli profunden, poste, kiam mi povos sed mi devis atendi iomete ĉar tiam mi preparis ekzamenojn. Mi kontaktis lokajn esperantistojn; Sinjoro Delamare-Moré informis min ke en 1950 okazos en Parizo la kongreso de U.E.A. Mi aĉetis tre kompletan kurslibron (Cours Pratique) kiun mi studis. Mi legis ankaŭ 2 librojn kaj kiam mi alvenis al la kongreso, mi tuj povis paroli kun iu ajn el la 2000 kongresanoj el 40 landoj. Mi tiom entuziasmiĝis pro tio ke mi tuj aliĝis al la sekvonta kongreso en Munkeno, kaj ankaŭ decidis instrui la lingvon. Iu el miaj lernantinoj estis unu el miaj fratinoj, kiu poste edziniĝis kun jugoslava esperantisto kies

patro ankaŭ parolis Esperanton kaj tiel povis paroli kun mia patro kaj mi ! Iom poste, mi renkontis junan esperantiston el Le Havre, kiu nun estas mia edzino kaj ni ambaŭ instruis Esperanton al niaj filoj. Aldonu al tio ke mia bopatro kiu estis hispana rifuĝinto ankaŭ flue parolis Esperanton, kaj ke nia jugoslava nepino kiu nun vivas en Germanio ankaŭ parolas ĝin. Vi certe komprenas kial mi deziras al nia lingvo plenan sukceson tra la tuta mondo por ke ĉiuj homoj povu kompreni unuj la aliajn.

Verŝajne, ankaŭ kelkaj el vi fariĝis esperantistoj iom neordinare. Ekzemple kiel denaskaj Esperantistoj (mi renkontis kelkajn el ili) aŭ tute almaniere. Ne hezitu rakonti tion al ni !

Unu el la bopatroj

Pierre POTTIER
Klubo de Yvetôt

Notre ami Pierre POTTIER est professeur d'Anglais en retraite

Il a vécu une vie espérantiste extraordinaire: son père était espérantiste; son cousin a épousé une espérantiste anglaise; sa soeur s'est mariée avec un espérantiste yougoslave; sa fiancée et son futur beau-père parlaient l'Espéranto; il a une petite fille en Allemagne qui parle notre langue; il a enseigné notre langue à ses fils. Sa belle-fille Catherine enseigne l'Espéranto à Rouen dans une librairie libertaire!

Que chacun des lecteurs de notre bulletin m'envoie un texte pour expliquer pourquoi et comment l'Espéranto l'a intéressé

P.KIJO.

BONAJN FERIOJN ni deziras al legantoj de nia bulteno!

Okaze de vojaĝoj, praktiku Esperanton

En nia regiono:

ROUEN : Catherine Domingo gvidas kurson en Rouen en librejo "L'Insoumise", rue St Hilaire. Sinjoro Bessière partoprenis Ĝeneralan Kunvenon de Katolika Asocio kaj kongreson de Esperanto-France en Strasbourg

GRAND QUEVILLY : La kunvenoj ne plu estas semajnaj sed monataj. P.Quillaud partoprenis kongreson de SAT-Amikaro en Vigy, apud Metz. Suzanne Helbert ĉeestis kongreson de Esperanto-France .

YVETÔT : La grupo "dormas" sed ĵurnalistino intervjuis S-ron Pottier pri historio de loka grupo kaj pri Esperanto ĝenerale. Rezulte, ŝi verkis bonegan tutpaĝan artikolon en gazeto "Le Courrier Cauchois". Post tio, kelkaj personoj interesiĝis kaj petis informojn

SAINT GERMAIN SUR AVRE : Yolande Paris skribas al ni: "Lastan jaron, mi partoprenis SAT-kongreson en Nagykanisza, U.E.A.kongreson en Zagreb kaj kongreson en Trieste. Tiu vojaĝo estis ja tre pozitiva kaj riĉiga. Krome, en Zagreb, mi renkontis alian normandon, Ph.Zilliox el St Just apud Vernon"

HEROUVILLE SAINT CLAIR : La klubkunvenoj okazas regule

Odile Masseron partoprenis kongreson de SAT-Amikaro en Vigy

NIA BULTENO : Sendu al la redaktanto viajn artikolojn kaj komunikojn por la Septembra numero Kiu bonvolas anstataŭigi min kiel redaktanto ? Mi atendas vian kandidatecon

ĜENERALA KUNVENO : Neniu klubo kandidatiĝis por organizi tiun devige statutan asembleon. Eble en Yvetôt dum Aŭtuno ???

APPEL DU TRESORIER : Nous voilà rendus à la moitié de l'année et de nombreux lecteurs du bulletin ne m'ont pas fait parvenir leur abonnement-cotisation pour 2002 (je vais même devoir rayer de notre liste ceux qui n'ont pas rayé 2001) Afin de m'éviter un travail supplémentaire de rappels individuels, veuillez consulter la liste ci-dessous Si votre nom ne s'y trouve pas, prière de vous mettre en règle dès que possible ou m'informer que vous ne désirez plus recevoir le bulletin.

LISTE DES ADHÉRENTS qui ont réglé leur abonnement 2002 :

Gesinjoroj Bataille, Bessière, Canu, Caron, Chalm, Colombel, Corrieu, Demmer, Domingo, Dubois, Duflo, Dufresne, Esp-Cotentin, Evrard, Frelon, Gibaux, Gibert, Gueroult, Guerre, Guilmoit, Haulard, Helbert, Huet, Jourdaïne M.L., Jouvin, Lamy, Langanay, Lebrun, Lecouvreur, Lemarchand, Lemenager, Leroy, Lesueur, Loisel, Loupiac, Magerel, Marie F., Mary P., Michaud, Millet, Moyon, Nardin, Nicolas, Paris, Paumier, Pilet, Pottier, Quillaud, Rauch, Robiollé, Rolland, Séry, Tanguy, Turmel, Zilliox

Je rappelle que l'abonnement à Normanda Bulteno n'est pas inclus dans les cotisations que vous versez aux organisations nationales ou internationales (UEA, Esperanto-France, SAT- Amikaro, etc.)

L'Union des Espérantistes de Normandie (Esperanto Normandie) est indépendante de ces associations.

SUBTENU GREZIJONON:

Publikigo de "50-jara Jubilea Libro pri la Esperantista Kulturdomo Grésillon"

Greziĵonanoj rakontas Greziĵonon, ekde ĝia naskiĝo, laŭ siaj memoraĵoj

Libro kun bonkvalitaj ilustraĵoj, 310 paĝoj, Prezo: 50 Eŭroj

Geamikoj de Grésillon, vi povas helpi tiun publikigon, sendante libervolan kontribuon aŭ vian antaŭmendon al M.Th.

Lloancy 6 rue Saint Michel 64000 Pau , CCP Bordeaux 5 908 07 A

FESTO 2002 aura lieu du 30 Août au 7 Septembre au Château de Grésillon , près de Baugé, entre Angers, Le Mans et Tours. Passez des vacances de château!!! Au coeur de la campagne française, dans un cadre agréable. Au contact de la nature, découvrez, amusez vous, tout au long de cette semaine que vous n'êtes pas prêt d'oublier! Festo est une rencontre internationale organisée par Esperanto-Jeunes pour convier une centaine de jeunes espérantophones du monde entier à venir découvrir la France et partager leurs diverses cultures dans une ambiance festive!

Programo: koncertoj, fotoateliero, vizito de abelujaro, naĝado, tablo-teniso, retpilko, voĵetoj por piedmarŝi, biblioteko, turismado en Valo de Lûaro ktp...

Por pliaj informoj kaj aliĝoj, kontaktu Dominique Corrieu 21 avenue Rauss 76370 en Berneval le Grand

aŭ Yves Bachimont 14 allée du Clos de la Prairie 14000 Caen

LE CONGRES DE SAT AMIKARO

Les espérantistes de SAT-Amikaro (env.125) ont tenu leur congrès dans un cadre inhabituel: le centre de l'Association Départementale d'Education Populaire et de Plein Air de Vigy, village situé à environ 25 Km de Metz. Georges Kersaudy et Henri Masson ont dédié leurs ouvrages respectifs ("Langues sans frontières", "L'Homme qui a défié Babel") et ont pu dialoguer avec les participants. Georges Kersaudy est vraiment un homme extraordinaire qui a pu s'adresser à tous les congressistes étrangers dans leur propre langue. Il connaît en fait plus de 50 langues mais, certes à divers degrés

Sur le plan de l'information, l'efficacité a été nulle : aucun journaliste!

Le programme des conférences pouvait satisfaire tous les goûts: sur l'écotourisme Petro Chrdle (Tchègue), sur l'utilisation de l'Espéranto en informatique (André Grossmann) et sur Internet (Bruno Masala), sur la campagne de l'Unesco (Armand Hubert), sur ATTAC (Catherine Roux). L'Amikeca Reto (Réseau d'amitié) a présenté son nouveau recueil d'adresses. Le service philatélique était tenu par Modesto Ramelli. Des organisations non-espérantistes étaient aussi invitées à tenir un stand : Amnesty International, Artisans du Monde, ATTAC, Confédération Paysanne

Le programme des spectacles consistait en des chansons en plusieurs langues, dont l'Espéranto, interprétées par le duo "Mannijo" et par Jak Le Puil, bien connu dans le milieu espérantiste.

Les débats sur la marche de l'association ont été constructifs. Une forte volonté se manifeste pour donner une impulsion à l'association. Chaque semaine, une permanence sera assurée de 14h à 18h par 2 personnes dans le nouveau local parisien qui deviendra officiellement le siège après des démarches administratives. Un projet de renouvellement complet de la revue plus ample, plus moderne, plus riche par le contenu a été mis en route.

Le Comité d'Organisation du Congrès s'est montré efficace, toujours disponible pour aider. A noter la grande compétence dans le choix des excursions et des visites guidées par un des membres du comité, Catherine Gallégo dont les langues de travail, dans le cadre de l'Office de Tourisme de Metz, incluent l'Espéranto. La ville de Metz mérite incontestablement la visite. Le romancier et humoriste espérantiste Raymond Schwartz qui y est né, a eu sa place dans les programmes de conférences et d'animation

En 2003, SAT-Amikaro tiendra son congrès au Cap d'Agde, pas très loin de Montpellier et de Sète où se tiennent des stages internationaux d'été.

Esperanto-Vendée envisage d'organiser en 2004 le congrès à La Roche-sur Yon, année du bicentenaire de la ville.

Un accord de principe a été accepté pour la coorganisation d'un congrès par toutes les organisations françaises d'Espéranto dans le nord de la France en 2005, vraisemblablement à Boulogne sur mer, pour le centième anniversaire du premier Conges Mondial d'Espéranto en 1905.

Henri MASSON

MON PREMIER CONGRES MONDIAL D'ESPERANTO-FRANCE A STRASBOURG

Pour la première fois, cette année, j'ai eu la possibilité de participer au congrès de l'espéranto en France qui s'est tenu à Strasbourg à la Pentecôte. Plusieurs associations se retrouvaient à l'occasion de ce congrès : Espéranto-France, Espéranto-France-Est, Espéranto-jeunes, l'association des travailleurs espérantistes l'association des catholiques espérantistes et l'association des enseignants en espéranto. Des rencontres très intéressantes en perspective !

Mon mari, ne parlant pas l'espéranto mais "sympathisant" m'accompagnait.

"Viens, "lui avais-je dit " L'ambiance sera chaleureuse et tu apprendras bien quelques mots durant le séjour ! "

Un premier congrès, c'est à la fois le plaisir de rencontrer des "samideanoj", d'utiliser cette langue qu'on n'a pas très souvent l'occasion de parler. C'est aussi une petite pointe d'appréhension : Vais-je comprendre et me faire comprendre?... Mais, les amis seront bienveillants et je pourrai toujours "krokodili" en cas de difficulté.

Le congrès se déroulait au coeur de la si belle et attachante ville de Strasbourg.

Merci aux organisateurs qui n'avaient pas ménagé leur peine pour proposer un programme riche, varié et attrayant.

Quelle bonne idée que la soirée du vendredi pour faire connaissance.

Le programme touristique préparé par Catherine Gallego était de grande qualité

La conférence en Français de Monsieur Georges Kersaudy, auteur de "Langues sans frontières" nous a appris une foule de choses passionnantes sans s'ennuyer un instant.

La soirée en compagnie du chanteur Morice Benin fut un vrai moment de bonheur. Nous avons pu apprécier cet artiste de talent pourtant bien peu connu du grand public dans des chansons en français mais aussi en espéranto.

Les groupes de travail proposaient de réfléchir plus précisément sur quelques thèmes relatifs à la vie du mouvement.

Alors ! Une réussite ce premier congrès ?

Eh bien pas autant que je l'espérais !

Je m'attendais à une ambiance beaucoup plus chaleureuse, à des participants désireux de se connaître de communiquer, d'échanger. Sur les 90 participants que nous étions, seules quelques personnes nous ont cordialement accueillis. Merci à elles.

De nombreuses personnes étaient sans doute habituées des congrès et retrouvaient des connaissances; des petits groupes se formaient et nous, nous nous sentions bien isolés. Des visages souriants, quelques mots de bienvenue nous auraient fait bien plaisir.

J'ai surtout été désolée pour ce débutant venu des Bouches du Rhône, désireux de s'impliquer et d'agir, qui participait au congrès dans l'espoir de nouer des contacts, d'avoir des informations pour se sentir moins seul dans sa région et qui a été bien surpris de trouver aussi peu de chaleur. Bien sûr, il y a des stages pour les débutants et les congrès ne sont pas le lieu pour se former mais ne peut-on quand même tenir la porte ouverte ?

Est-il impensable de résumer très brièvement en Français les points essentiels de l'assemblée générale pour permettre à de telles personnes de se sentir intégrées. Il est reparti en estimant avoir quand même (douloureusement) progressé mais sans avoir trouvé "l'esprit espérantiste"

Les débutants d'aujourd'hui sont la relève de notre mouvement, ils ont besoin de l'accueil chaleureux des espérantistes chevronnés pour avoir envie de continuer.

Suzanne HELBERT
Groupe de Grand Quevilly

OKAZONTAJ INTERNACIAJ KONGRESOJ KAJ STAĜOJ:

Nepre, partoprenu: Eŭropa Kongreso en Verona (Italio) 23/28 Aŭgusto, Universala Kongreso en Fortaleza(Brazilio) 3/10 Aŭgusto, SAT Kongreso en Alicante (Hispanio) 1/8 Julio, Internacia Katolika Kongreso en Kromeriz (Ĉeĥio) 17/24 Aŭgusto, Internacia Esperanto Konferenco en Leuven(Belgio) 20/26 Julio, Internacia Semajno ĉe Mediteraneo en Sète 24/31 Aŭgusto, Rencontres Internationales en Plouezec 17/24 Aŭgusto
Ankaŭ ne forgesu, la staĝojn organizitajn per "Kvinpetalo" en Bouresse, kaj tiujn kiuj okazos, ĉi-somere en Grésillon

En Sangatte, rifuĝintoj serĉas azilon

Sangatte estas malgranda somerumejo situanta je 9 Kilometroj de Calais kaj proksimume 30 Km for de Anglio kien oni povas veturi ŝipe kaj precipe trajne per la "shuttle" kiu trapasas la submaran tunelon. En Sangatte, loĝas proksimume 800 geloĝantoj.

Dum septembro 1999, ŝtato malfermigis centron por gastigado de rifuĝintoj. Tiam multaj homoj devenis el Kosovo pro milito en Jugoslavio. La rifuĝcentro situas je 2 km for de la enirejo de la tunelo. Ĝi estis hangaro de Eurotunnel rekvizicita pro la premo de humanaj asocioj kaj Emmaüs. La centro estas administrata de Ruĝa Kruco. Ĝi havas ekskluzive humanan celon : loĝi, nutri kaj flegi la elmigrintojn. Nuntempe, proksimume 1500 homoj loĝas tie. (Depost la malfermado, 40000 pasadis tie)

Tiuj personoj venas el Irano, Irako, Turkio (Kurdoj), Ŝrilanko, kaj nun multaj alvenas el Afganio. Ili fuĝis el siaj landoj pro ekonomiaj aŭ politikaj kialoj. Tre ofte, ili elspezis siajn posedaĵojn por pagi la veturadon organizitan de mafiulo.

Kial ili volas vivi en Anglio ?

Unue, multaj el ili venas el angloparolantaj landoj kiuj havas historiajn kaj kulturajn rilatojn kun Anglio. La interhelpaj kaj dignorajtaj asocioj estas pli disvolviĝitaj ol en Francio. Tamen la angla leĝo fariĝis malpli favora depost 1999. Anglio estas la nura lando en Eŭropo kie ne ekzistas identigan karton, do, tre malmulte da kontroloj. Plie, en Anglio, persono kiu petas azilon rajtas labori post 6 monata-restado. Kontraŭleĝaj dungistoj ne estas punataj. Tre malofte, enmigrintoj estas elpelitaj.

75000 personoj petis azilon dum la jaro 2000. Por Britoj, tio estas "invado"! La kontroloj estas pli kaj pli severaj. Grupoj da viroj provis iri piede tra la tunelo ĝis Anglio. Pluraj el ili mortis, elektro-kutitaj, asfiksiitaj. Aliaj estis subveturigitaj de aŭtomobiloj kiam ili, nokte, trapasis aŭtovojon.

La etoso, meze de la centro estas pli kaj pli kriza pro troloĝateco.

Tamen, la delikteto malkreskis en la regiono (multaj policistoj gardostaras apud la centro). La geloĝantoj de Sangatte timas kaj ksenofobio, kuraĝigita de iuj politikistoj, disvolviĝas.

Urĝas ke politika volo de ĉiuj landoj en Eŭropa ŝanĝo manifestiĝu por trovi humanistajn kaj realistajn solvojn.

Suzanne HELBERT

FERIEJO EN CENTER PARC

Mi pasigis kun mia filino, mia bofilo, mia nepo kaj kelkaj geamikoj unu vintran semajnon en regiono "Sologne", apud La Motte-Beuvron .

En Center Parc, estas ĉirkaŭ 1000 dometoj en pinarbaro. Estis multe da riveretoj kaj lagoj . La arboj estis blankaj pro prujno. La riveretoj kaj lagoj estis frostigitaj. La pejzaĝo estis belega !

En parto de tiu feriejo, troviĝis je nia dispono, kelkaj butikoj, restoracioj, naĝejo, akvo-ludoj, toboganoj, baseno kun ŝprucanta akvo (ĵakuzio), rivereto kun varma akvo...

Multaj plantoj kaj arboj kreskis

La akvo-ludoj estis senpagaj sed estis multaj aliaj distraĵoj kiuj estis multekostaj.

Interne de Center-Parc, aŭtomobiloj kaj motorcikloj ne rajtas veturi. Nur piedirado kaj biciklado!

Mi vizitis tiun feriejon vintre, sed somere kreskas multaj vegetaĵoj, multe da eriko. Certe estas ankoraŭ pli bele kaj pli agrable.

Josiane DEFRANCE

Grupo de Grand Quevilly

Jen simpla teksto. Ne hezitu sendi al mi vian kontribuadon por nia bulteno

La redaktanto

ABELOJ

Mia patro havis du hobiojn : ĝardeno kaj abeloj. Lia patro (do mia avo) havis kelkajn abelujojn. La leĝo permesas maksimume dek abelujojn. Pli estas konsiderate kiel profesio. Do, ekde mia plej juna aĝo, mi vidis kaj vivis kun abeloj. Komence, mia patro havis nur unu abelujojn. Poste la nombro kreskis ĉar somere abeloj esamenas kaj faras alian svarmon. Kelkfoje, abelsvarmo esamenas plurfoje, do ĝi estas pli kaj pli eta. Tradicie la maljuna abelreĝino forflugas kun la nova esameno; la juna reĝino restas en la abelujo. La abeloj bredas plurajn reĝinojn. Plenkreskulinoj batalas: unu sola devas resti aŭ foriri se estas la svarmsezo.

Kiam la abelreĝino estas larvo, ĝi ricevas specialan nutraĵon preparitan de junaj abeloj. La nutraĵo de simplaj abeloj estas pli simpla baze de mielo kaj poleno. Rezultas granda diferenco : abelo vivas tri semajnojn; reĝino vivas kvin jarojn kaj ellasos unu miliono kaj kvin cent mil ovojn dum sia tuta vivo.

La abelreĝino havas sian propran odoron. La abeloj sin rekonas reciproke pro tiu samaodoro. En abelujo oni trovas: mielon, polenon, propolison kaj vakson. Abelisto povas facile rikolti polenon sed "reĝino" nutraĵo estas fakula laboro.

La abeloj komunikas per stranga maniero: ili dancas por indiki lokon kie troviĝas floroj, polenoj, nektaro kaj akvo ĉar abeloj bezonas akvon por fari kaj miksi mielon. Mielo estas la nutraĵo de abeloj, ankaŭ dum la malvarma sezono. Do, abelisto ne povas eltiri tro da mielo el abelujo. Kiam abeloj esamenas, ili estas miele plenplenaj (jen iliaj provizoj) . En tia momento, abeloj ne povas pikvundi (ilia abdomeno estas tro plena) Tiam, oni povas meti la manon en centron de esameno (Mi ne provis tion fari)

Tio memorigas al mi aventuron kiu okazis kiam mi estis infano : Iu diris al mi : " Kiam oni retenas sian spiradon, la urtikoj ne pikas"...Antaŭ la gepatra domo, estis paŝtejo kun granda spaco plena da urtikoj. Mi ne havis longan pantalonon ; mi kurante trapasis la surfacon kaj rapide ruĝiĝis miaj kruroj. Larĝaj vezikoj ŝvelantaj kovris ilin. Kion fari ? Kia solvo? Mi sidiĝis teren kaj metis herbojn miaj gamboj ; mi ĝuis la freŝan herbon....

Hodiaŭ mi ankoraŭ memoras!!!

Dominique LEROY
Grupo de Grand Quevilly

PIA ANEKDOTO

Laŭ la leĝo de Moizo, la antikvaj judoj ŝtonmortigis la adultajn virinojn. Iam, oni alportis al Jesuo virinon dumfare surprizitan rilate tiu delikto (Johano 8,7). Li diris al la ĉeestantoj : "Tiu kiu neniam pekis ĵetu al ŝi la unuan ŝtonon" . Li kredis ke ĉiuj ege konsciaj pri siaj pekoj, sindetenus lanĉi tiun fatalan unuan ŝtonon.

Sed la Sankta Virgulino eliris el la vicoj, elprenis teren ŝtonon kaj estis ĝin ĵetonta kiam Jesuo admonis ŝin :
"- Panjo, ne troigu !"

Henri Rousseau

La venonta bulteno aperos fine de Septembro. Estu kuraĝaj ! Verku artikolojn kaj sendu ilin al mi plej malfrue, meze de Septembro

La Redaktanto